

POLA ESPERANTISTO

(Esperantista Polski)


MONATA GAZETO DE POLAJ ESPERANTISTOJ
LA GAZETO ESTAS FIDELA AL LA BULONJA DEKLARO.

„Esperantista jest kaŝy, kto zna jezyk „Esperanto” i uŝywa go dla jakichbądź celów”.

DEKLARACJA BULOŃSKA.

„Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kiaj celoj li ĝin uzas”.

BULONJA DEKLARO.



„Sądzimy, że służąc naszej Ojczyźnie, Esperanto najlepiej służyć będzie sobie”.

DEKLARACJA POZNAŃSKA.

„Ni kredas, ke servante nian Patrujon, Esperanto plej bone servos sin mem”.

POZNANJA DEKLARO.

ENHAVO:

Jan Kostecki: Kie okazis en Vien. — Karol Pigłowski: Impresoj. — Stanisław Braun: Vojon serĉas mi. Mi ĉizis. — Karol Pigłowski: Waclaw Slezoszewski. — Uczestnik: Polska na XVI Kongresie Esperantystów w Wiedniu. — Missiĝo esperancki. Libroj kaj gazetoj.

Ĉiu

literaturamanto
propagandisto
serioza esperantisto

abonu
la monatan, bele ilustritan revuon

Literatura Mondo

Redakcio kaj Administracio:
Budapest VI, Andrassy ut. 81.

Jarabono (12 numeroj) 10 fr. sv.

ELDONA SOCIETO

„POLA ESPERANTISTO“

KOMP. KUN LIM. RESP.

WIDOK 19, WARSZAWA, POLUJO.

AKCEPTAS LIBROJN,
PROPAGANDILOJN KAJ ALIAJN
ESPERANTAĴOJN POR KOMISIA VENDADO.

POLA ESPERANTISTO

(Esperantista Polski)

JARO XVIII.

WARSZAWA — AUGUSTO 1924.

Nº 8 (106)

Kio okazis en Wien.

Estas io nereala en ĉiu esperantista kongreso... Jen mi revenis de Vieno, kaj ĵus trovis sur mia varsovia skribtablo novan verkon de tiu arda aŭtoro, Jean Forge: „Saltego trans jarmiloj“. Saltego trans jarmiloj! Estas ĝi, tiu stranga sento, la „nova sento de la esperantoj“, kiu skuas kaj dorlotas la koron, kiam ĉe kongreso multnacia anaro ekkantas kune la genian Himnon de Zamenhof. Malfermiĝas la Morgaŭo, malaperas intergentaj bataloj, homaro unuigita rigardas la vizion de sia glora kaj mistera estonto.

Ĉiuj kongresoj nepre devus komenciĝi per tiu komuna kantado de la Himno. Se la „nova ordo“, kiun oni spertigis al ni en Wien, enhavus nur tiun solan eraron, ke ĝi lasis nin atendi la Himnon dum 3 tagoj kaj antaŭigis ĝin per alia muzikaĵo, ĝi jam pro tio estus kondamninda!

Sed neniu defendas plu la „novan ordon“ — kaj de la venonta kongreso ni certe revenos al la malnova, mi do ne intencas ĉi-tie la simpatiajn, fervorajn vienanojn pri ĝi kulpigi. Ili laboris multe kaj sukcesplene. Ili ĝuigis al ni interesajn manifestaciojn, modelan teatro-prezentadon, ĉiutagan esperantan kabaredon, luksajn ekskursojn, penis, efektive penis, faciligi ĉiujn necesajojn de la vivo. Se la diskutsalono montriĝis iafoje tro vasta pro manko de diskutantoj, tio ne estis ja ilia kulpo. Estis kulpo de tiu ĉarmoplana urbo Wien, nepre tro bela, tro alloga kaj interesa por aranĝo de kongresoj! Tial, karaj vienanoj, forgesu la malicaĵojn, kiujn diris kelkaj esperantistoj; memoru, ke tiu kritikas plej multe, kiu mem nenion faras. En la nomo de polaj partoprenintoj, mi ĉi-tie sincere kaj kore dankas vin pro via afableco, via proverba gastameco, via fervora laborado, kaj krias: — vivu Vienaj Esperantistoj!

Dum unua laborkunsido, iom strange nomita: „interna malfermo de la kongresa laboro“, okaze troviĝinte sur la prezida estrado, mi havis la plezuron bone observi la ĉeestantaron, plenigintan la „mezan salonegon“. Tre agrabla, esperiga vidaĵo ĝi estis. Entuziasme brilaj okuloj, inteligentaj vizaĝoj, ĉarmaj virinoj, fervora junularo, imponaj kapoj de grizharuloj — tuta homaro en miniaturo, sed ia homaro transformita, atentema al la granda parolo de amo, kiu tuj eksonos, ekmelodios, en mirakle rapida movo suprenlevos kaj portos ĉiujn al tiu fabela verda haveno, kien iras tra fulmotondroj kaj ventoj nia esperanta ŝipo. Imagu, se tiam ekbruus la himno, kiel ĝi devus skui ĉies koron! Ja eĉ la ŝtona koro, kiun ĉiam kunportas en sia poŝo la Kavaliro de la Verda Stelo, samideano Edgardo Grot de Latvujo — eĉ tiu koro-ŝtono ekbatus en sia malluma ujo!

Sed oni ne kantis la Himnon. Oni servis al ni raportojn, kaj servadis ilin en diversaj saŭcoj, iafaĵe acidaj, ĝis la lasta tago de la kongreso. Nur dum lasta kunsido, kaj nur meze de ĝi, ni aŭdis fine la prezidanton legi unuan kaj solan proponon. Tamen nia intereso baldaŭ falis: ĝi estis ja nia, bone konata propono de la Pola Asocio.

Ĉu estas necese martelfrapi la entuziasmon per tiel multaj kaj longaj raportoj? Ĉu ne estus bone endigigi ilin en la tempkadron de unu tago?

Kongreso estas ja, antaŭ ĉio, tio - ĉi: festo familia de nova, naskiĝanta homaro, kie oni kun ĝojo salutas amikojn mirindajn, ĉar ĝis nun neviditajn, kaj tiel bone konatajn, tiel karajn al la koro! Ĝi do devas esti tiel organizata, ke ĝi donu plej grandajn eblecojn de la komuna kunvivo, ke ĝi fortigu la noblajn sentojn, instruu nin marŝi tra la vojo, kiun elhakis la kara Majstro. Ne estas necese tiom paroli pri kalkuloj kaj financa malordo! Parolu pri ili kontrolkomisionoj, esploru ĉion zorge, sed ne lasu per siaj sekaj vortoj malvarmiĝi la senton de tiuj junaj homoj, kiuj unuafoje venis en Esperantujon, kaj volas kaj rajtas libere spiri ĝian vivigan aeron.

Por tiuj junuloj, por nia gloro kaj espero, la C. K. devas aranĝi kongreson en venonta jaro. Se ne invitos Edinburgo, okazu ĝi en Svisujo, sed okazu nepre, ĉar alie ni bedaŭros kaj pie honoros la ombron de tiu K. K. K., kiun oni ordonis al ni malligi en Vieno.

Alia momento estis tre agrabla: tiu de la oficiala malfermo. Eksonis majstra voĉo de Privat. Ekparolis la noro de naciaj reprezentantoj, tiu impona ĥoro, atestanta la unuecon de la homaro, atestanta la potencon de Esperanto. Ĉiu delegito rajtis paroli nur 1 minuton, kaj komencis la saluton en sia nacia

lingvo. Preskaŭ ĉiu parolis saĝe kaj brile. Vere, la intelekta nivelo de niaj kongresanaroj videble altiĝas. Jam malaperis tiuj kompatindaj stranguloj, kiuj havis la verdan stelon eĉ sur pantalono, sed la kapinternon ankaŭ verda...

Poste ni fine ekkantis la Himnon. Flugis ĝi potence, fluis majeste kaj forte, komuniigante la korojn por estonta vivo, por nia nova mondo, kiu venas, radia kaj venka, anstataŭi miljarajn malfeliĉojn, sangajn batalojn, larman malliberon de homoj...

Ĉe tiu bela soleno mankis nur unu tradicia kaj grava momento: la honorigo de la memoro de mortintoj. Oni poste atentigis multe pri tiu malgraŭvola, certe, forgeso.

Rememorigante la vian kongreson, neeble estas ne citi du eminentajn okazaĵojn: la Radio-vesperon, dum kiu ni aŭdis nian karan lingvon triumfi laŭ klareco super multaj lingvoj eŭropaj — kaj la Pacan Manifestacion, tiel efike sukcesintan. Ĉu inter la ambaŭ ne ekzistas interna ligilo? — La Radio portas homan voĉon ekster landlimojn, la Pacifismo portas la amon al homoj trans ĉiujn patrujojn, trans ĉiujn militistajn kordonojn.

Venis la memorinda horo, kiam la propono de nia Asocio troviĝis sur la tagordo. Legis ĝin la prezidanto, Dro Privat. Mallonge motivis ĝin la subskribinto. Malfermiĝis diskutado. Estis vere ĝojiga, kortuŝa momento por ni, fidelaj sekvantoj de la Lingva Komitato, kiam ni aŭdis la ĉefajn esperantistojn de ĉiuj landoj, la plej meritoplenajn propagandistojn, kiam ni aŭdis la filinon de nia Majstro mem, Finon Lidja Zamenhof, unuvoĉe aprobi kaj subteni ĝin. *Ne pereos Esperanto!* Esperantistoj komprenas la grandan danĝeron, per kiu minacas la komenciĝinta lingva haoso, ili volas kaj postulas, ke neniu tuŝu al la trezoro de Zamenhof!

Tamen troviĝis unu persono, kiu deziris, ke la proponon oni „lasu, kiel ĝi estas“: la blinda S^o Eroŝenko, ĉiam tiel amuzige diskutanta kun Privat. Ni notas tiun fakton pro la intereso.

Kun ŝanĝoj, proponitaj de nia angla samideano Edmonds, sekretario de C. K., la propono estis unuanime akceptita. La kongreso konstatis solene, ke „*la Akademio kaj la Lingva Komitato estas unika kaj plej alta aŭtoritato en lingvaj aferoj.*“ Tiu rezulto de la voĉdonado estis salutita de varma aplaŭdo.

Dum la diskuto kelkfoje aŭdiĝis la nomo de U. E. A. Tia ne astis la intenco de la proponintoj. Nia Universala Asocio, tiom valora kaj vigla, meritas krediton moralan. Se ĝi eble eraris, oni ne tuj rapidu ĝin kulpigi. Dum la angla-boera milito, kiam en Eŭropo multa malbono dirata estis pri Britujo,

skribis nia Sienkiewicz:*) „*Dajcie wy spokój duszy angielskiej!*“ — „Lasu vi la britan animon trankvila!“ — Tiujn vortojn mi ŝatus nun memorigi, mi ŝatus diri: — „*Fidu al U. E. A. Ĝi servas fortike nian aferon. Ĝi amas nian esperantan lingvon. Ĝia ĉefo estas Privat, kiun ni ĉiuj respektas kaj admiras.*“ —

Karaj amikoj, ĉi-tie mi volas turni vian atenton al la persono, kiu ne ĉeestinte la kongreson, pro grava malsano, spirite estis tamen ligita kun la propono de la Pola Asocio. Vi scias, ke mi pensas pri nia kara Prezidanto de la Akademio kaj de la Lingva Komitato, atestimata Profesoro Cart. Kion al lia senlaca laboro, al lia patra zorgemo ŝuldas nia movado, tion ĝis nun nemultaj ĝuste komprenas. Sen emfazo oni povas aserti, ke ne ekzistus jam nia lingvo, se post la morto de nia Majstro tiu fiera Pioniro ne stariĝus sur lia loko por defendi la netuŝeblecon de la Fundamento, la unuecon de Esperanto, kontraŭ konstantaj atakoj de mallongvidaj homoj, al kiuj ne plaĉas tiu aŭ alia vorto, tiu aŭ alia sufikso, kiuj pro sia propra famo nepre volas ion ŝanĝi, aldoni, trudi al la tuta homaro siajn fantazietojn — „korekti la kolegon Zamenhof“.

Kara Prezidanto, honoron al Vi, kaj dankon! Dankon ne nur de ni, malgranda anaro de batalantoj, sed dankon en la nomo de ĉiuj popoloj, al kiuj Vi transdonos ilian komunan lingvon en ĝia principa freŝeco kaj beleco, kiel ĝin naskis dum sankta tremo de inspiro nia genia Majstro!

Kelkaj raportoj ankoraŭ. Tiuj de fakaj kunsidoj. Ni ekscias kun plezuro, ke la Internacia Studenta Ligo, ĵus fondita, elektis Warsawan por sia sidejo. Bonvenu!

Sekvas diskuto pri la venonta kongreso. Neniu urbo invitis por 1925... Granda sensacio! Ĉu ne tial ĝi okazis, ke oni kredis tra la mondo, ke la invitoj estos tro multaj? Estonte la C. K. povos facile evitigi al ni tiajn surprizojn, enketante pri la afero antaŭ la kongreso.

Ŝo Privat leviĝas. Li dankas la organizintojn, li deklaras la kongreson fermita. Oni ekkantas la Himnon. La kongresa estraro iom rapide forlasas sian tablon. Ni ŝatus, ke oni ne rapidu, dum la Himno estas kantata.

.....

Jen kelkaj vortoj pri tio, kio okazis en Vieno. La bildo estas nekompleta, ĝi ne scias prezenti al vi la tutan ĉarmon de tiu unika okazaĵo, kia estas ĉiam Esperantista Kongreso. Por bone senti ĝin, oni devus, kiel mi, veni la sekvanton tagon en

*) La genia aŭtoro de „*Quo vadis*“.

la kongresan sidejon. Muta ĝi estis, malplena, malluma. Malaperis standardoj, surskriboj, propagandiloj. Malaperis ankaŭ homoj. Sed kun ĉio-ĉi malaperis io pli. Malaperis la sonĝo pri homa feliĉo, homa amo, homa unueco. „Saltego trans jar-miloj“ finiĝis. Ni revenis al la reala vivo. Kaj en la pala lumo de tiu realo la ĉarma urbo Wien fariĝis tiel funebra, ke mi ekdeziris tuj forkuri de ĝi...

Mi ne povas fini mian raporton ne menciinte tre gravan fakton, pri kiu ni eksciis en Vieno: iu amerika riĉulo testamente oferis por la propagando de „lingvo internacia“, ne de Esperanto, sed de tiu lingvo, kiun elektos certaj difinitaj personoj, la grandegan sumon de 1.500.000 dolaroj. Tiu absolute aŭtentika ofero estas tiom decidpova, ke, mi kredas, la C. K. nepre devus starigi *ad hoc* komisionon por zorge informi kaj dokumentigi pri Esperanto la diritajn personojn. Mi esperas, ke tiuj miaj vortoj trovos afablan orelon inter la membraro de C. K.

Ankoraŭ unu rimarko. Malagraba, sed necesa. Dum la kongreso, unu esperantista organizaĵo, kun kies celoj mi simpatias, uzis metodon de propagando rekte por ĝi malutilan. Ĝi eldonis flugfolion kun la titolo: „Kiu estas vera esperantisto?“ — „Vera esperantisto“ estas nur membro de tiu organizaĵo. Same oni parolis, laŭtparolis dum la kunsidoj. Ĉu tio varbos novajn membrojn? Tiaj „kuraciloj“ estas ja pli danĝeraj, ol la malsano: ili mortigas la pacienton.

Ni deziras, ke li vivu.

Jan Kostecki.

Impresoj.

MAŜINOJ.

Tondro, grinco, svingo, ĝemo, peto, veo, krako, siblo, fajfo..
de Satano rido!

Fabriko...

Kaj en ĝi maŝinoj, kaj ĉirkaŭ ili — nigraj de laboro homoj..

Sklavoj de maŝinoj — laboristoj..

Ili karesas, dorletas tiun plej belan sian amatinon-maŝinon. Kaj malgraŭ, ke ŝi estas sinjorino fiera kaj postulema — kun preskaŭ dia adoro ili priseivas ŝin — kaj karesas.

Kaj se iu, foje, malatentan faros antaŭ ŝi riverencon, aŭ senzorge plenumos homagion — kaptos lin la fiera sinjorino — kaj masakros, dispremos, frakasos, kaj ne kortuŝos ŝin la ploro de restigita infanoj, aŭ la ĝemoj de senforta pro doloro edzino, amatino...

Foje ŝi nur manon elŝiros el sub la brako kaj jetos ĝin alten, supren, sub la plafonon... Kaj ĝi ekpendos!...

He, al tia servi sinjorino!

Kaj tamen ili servas... la sklavoj!

Ĉar kiam feron ili trafas je plugiloj — iras la Pacanĝelo tra la haloj, kaj fruntojn kisas sangitajn — kaj flustras: „Pax“!

Kaj kiam feron ili trafas je glavoj — Satano ridaĉas en la maŝinoj: al batalo! al batalo! al batalo!..

Dio konfuzas tiam la homajn prudentojn, Satano pretigas la glavojn... kaj poste nur maroj da sango.. da sango!

Satano embriigas la maŝinon, la maŝino iĝas strata knabinaĉo, kaj la sklavoj — bastardoj de Satano. La sklavoj mortigos la Pacanĝelon, sed fieran sian sinjorinon-stratknabinon ili jam ne forlasos, ĉar amas ŝin jam ĝismorte...

Kaj el tio maroj da sango — kaj malfeliĉo!

BRANĈETO DE POMARBO.

Venu, mia infano, ni iros en la ĝardenon rozkovritan per larmoj de printempa mateno, mi ŝiros al vi branĉeton de floranta pomarbo — kaj diros, ke la bona Dio forprenis al homoj la doloron.

Iru kun mi en la spalirojn de florantaj pomarboj, kaj mi diros al vi, ke la homoj ĉesis suferi.

Venu, kaj ekkredul!...

Aromas la printempa ĝardeno, kiel via buŝo miela, kiel brustoj viaj rondformaj, junaj, kiel odoroj degelantaj sur pintoj ruĝumitaj, aromas la printempa ĝardeno pomarba, kiel la senkulpa, pura, blanka korpo via..

Aromas la abunda je multego da floroj pomarbo, kiel aromas viaj vangoj en momento de amtemo...

(Mi ŝiris rozan branĉeton. Matenaj larmoj, kvazaŭ perloj, falis sur teron de la floranta pomarbo.)

(Mi premis al miaj lipoj la floron.)

„Prenu ĉi-tiun branĉeton de floranta pomarbo, premu ĝin al viaj mirindaj, purpuraj lipoj — kaj diru al mi, kion ekflustris al vi la floroj...“

„...ili ekflustris, ke en ĉi-momento sur la tuta vasta mondo ektemis pro doloro nek unu homa koro“...

MIZERULOJ.

Mizerulo estas — kiu elektis hodiaŭ sian homecon.

Mizerulo estas — kiu, postkurante riĉaĵojn, forgesis pri tio, ke ekzistas ankoraŭ la proksimulo.

Mizeruloj estas hodiaŭ ne nur la kompatindaj homaj vermoj, ĉi-figuroj sensignifaj sed fierblovitaj — mizeruloj estas hodiaŭ ŝtatoj, nacioj, landoj, kiuj post la sanga draŝo konstruas monumentojn de Moloĥo-Ora Bovido.

Mizerulo estas la „homo nuntempa“.

Eliris en la mondon la mizero de l'animo kaj serĉas la homecon.

Ĉu longe ĝin serĉos?...

NE ESTAS MALFELIĈO...

Ne estas malfeliĉo morti, malfeliĉo estas vivi por Morgaŭ.
Ne suferas tiu, kiu mortis; doloras la kutimiĝo al viva homo.
La kutimiĝo—ĝi estas faruzo de multaj, multaj sentoj, pro kiuj domaĝe, ĉar la kutimiĝo finiĝas per adiaŭo por ĉiam (mortol)— kaj pro tio la doloro, pro tio la perdo de tiom da sentoj.

Oni ne devas ŝiri vestojn, klam mortas iu kara kaj proksima; kion tamen fari, se oni ĉiam veas, ĉar tiel doloras la elŝirata kutimiĝo.

Ne estas, vers ne estas malfeliĉo — morti!...

BLASFEMOJ.

I.

Se temas pri la leĝo, do en kiu ajn lingvo ĝi estus skribita, mi povus ĉiam krimi kontraŭ ĝi. Ĉar la skribita leĝo neniam povas postsekvi la riĉegan esencon de l'vivo, ĝi ĉiam malfruas kaj ĉiam estas tro malnova, klam ni volas ĝin adapti.

Mi volus ankoraŭ vidi juĝojn, kiuj ne limiĝos sole je la seka leĝolitero, sed obeos la voĉon de l'konscienco, la pruvon absolute veran kaj aŭskultos atestantojn, kiuj ne ĵuras, sed parolas veron.

Mi volus vidi almenaŭ unufoje justan kaj saĝan juĝiston.

II.

Plej malmorala metio en homa vivo—estas, ŝajnas al mi—la advokata metio. Ne ekzistas iu pli fia metio! Defendi pravecon, kiu tute ne ekzistas, elserĉadi artifikojn, por erarigi la justecon, serĉi ruzajojn, por fermi antaŭ la afero la pardonon de konscienco. kaj mensogi, mensogi, tiel terure mensogi!...

Kiom trafa estas la difino de advokato en la pola ŝtelista ĵargono: dungita fibuŝo!

LIBROJ KAJ HOMOJ.

Ekzistas libroj, kiuj jam dumlege permesas juĝi pri la fino; ekzistas libroj, kies fino klarigas al ni la internan esencon. Same estas kun la homoj. Ekzistas tiaj, kies kelke da

frazoj sufiĉas por ilia difino, ekzistas poste aliaj, kiujn ni ekkonas nur post longa kaj plenpena esplorado, kaj nur la finaj esploroj klarigas al ni la nekomprenablajn por ni iamajn momentojn de l'vivo.

La unuaj el tiuj kaj aliaj — jen estas la plimulto de libroj kaj homoj.

PRI INDIVIDUECO.

La arton mi komprenas kiel aferon senkondiĉe individuan. Diroj de ĉiaspecaj kritikistoj, ke tiu aŭ alia artisto (se jam la nomon de artisto li „meritis“) estis aŭ estas aŭ liberigita ne povas de influo de tia aŭ alia majstro, kiu kreis krom la verkoj — ankoraŭ „sian skolon“ — tiaj diroj neniel malpligrigas la valoron de l'artisto.

Neniam ni povas scii precize, kie finiĝas la influoj kaj kie komenciĝas la memstareco; ĉar la influoj ne estas kopioj farataj en Louvre aŭ en la Dresdena Galerio — tio estas subkonsciaj memoradoj, se mi tiel povas diri, kiuj penetras en la manon, en la cerbon, en la animon... Tio estas memoradoj de objektoj legitaj aŭ viditaj. Ĉiu artisto devis havi antaŭulon, en kies okulojn li iam ekrigardis.

La samo estas kun la t. n. inteligenteco. Neniam ni scias precize, kie estas la limoj de nia mondrigardo kaj kie de la fremda.

Ne meritas la nomon de artisto aŭ kreanto tiu, kiu ĝis fino de sia verkado sin tenus je la patrina antaŭtuko, t. e., ke en la verkado li baziĝus sole je memorado de tio, kion kreis lia majstro.

„La disĉiplo superis la majstron“ — tiu diro signifas pliperfektigon de la direkto de sia majstro, ĝi estas la liberigo plej rapida el sub liaj influoj kaj konstruo de propra ideojpalaco.

La grandaj spiritoj, kiel Leonardo da Vinci, Michel-Angelo, Goethe, Mickiewicz... jen la spiritoj tiom klaraj en sia eksklusiva krea individualismo. Esti artisto, signifas krei krom tiuj grandecoj — ankoraŭ sian propran grandecon...

Karol Piłowski.



VOJON SERĈAS MI.

*Vojon serĉas mi tiun luman, ĉielmigran,
Kies klara direkto en koro sin trovas,
La vojon, kiu diajn titanojn elkovas
Kaj strias radiantan en la nokton nigran.*

*Vojon serĉas mi tiun luman, ĉielmigran,
Kiun sekvi senlace nur anĝeloj povas,
Tiun vojon mi serĉas, kiu tronojn movas,
De senlimoj fulmtondre tranĉas spacon nigran,*

*Tiun vojon mi serĉas... Kaj staras sur roko,
Kiel birdo jam preta por longa elflugo,
Atendante ĝis venos eĥo por la voko*

*Kaj malĉenos min fine el la tera jugo.
Mi atendas... en brusto flamas la espero
Kaj logasflug' senfina en pura aero.*

Stanisław Braun.

MI ĈIZIS.

*Mi ĉizis sur granito la revon de l'homo,
Ĉar mano mia tremis per fort' dipotenco,
Kaj en koro elkreskis sem' maturesenco,
Ĉar mi vojon elĉizi volis por atomo.*

*Tie, supre, troviĝas mia blua domo,
Tiel tute alia, tiel diferenca —
Kaj granito sentrema, muro pacienco
Vojon montras al hejmo tiu sen la nomo.*

*Sur ĝi volis elĉizi mi alvokon sangon:
Tien iru, aspiraj, kie la aŭroroj
Per reĝkronoj origas la pinton lavangan*

*En rozaj de tagiĝo, en vekigaj horoj!
Mi volis fortan signon meti sur la muron
Ilo krevis — elĉizis mi karikaturon.*

Stanisław Braun.

Wacław Sieroszewski.

La aŭtoro de l' verko „Dekdu jaroj en lando de Jakutoj“ apartenas al maloftaj en Polujo verkistoj de ekzotaj romanoj, malgraŭ, ke tiu ekzotesco estis nur hazardo en la vivo de Wacław Sieroszewski.

Flankenlasante la ekzotecon de kelkaj liaj romanoj, ni povas nomi Sieroszewski'n verkisto, kiun naskis la postribelaj (1863) kondiĉoj, t. e., la pluaĵ eĥoj de batalo de pola nacio pri la sendependeco.

Sieroszewski prezentas vŝran tipon de batalanto en la batalo kun la moskvanoj, kun la premego, kun la ĉikanoj—li estas tipo de tiu ideulo, kiu siajn parolojn, idealojn traforĝas je agoj — ĉar nur la ago estas la sola respondo, la sola viva dokumento en batalo pri la sendependeco de viva nacio.

Sur la areno de pola vivo aperas Sieroszewski en jaro 1877, en la tempo, kiam inter la varsovia junularo reviviĝas la tipo de pola konspiranto. Komenciĝas la batalo kun la ekspluato de laboristo, la unua batalo kun la kapitalismo—la pola socialismo faras la unuaj paŝojn.

Bolesław Limanowski, granda teoriulo de pola socialismo, nunne pola senatano, vivigas la velkintajn idealojn de ribelo 1863; aperas vico da verkaĵoj, pentrantaj tiun flamantan lavangon de nova spirtribelo. Tiu ribelo ne alprenas tamen konkretajn formojn, ne esprimiĝas en ia elementa ago, ne kristaliĝas, kiel en la jaroj 1831 aŭ 1863. La rusoj penas male ligi ĉian movadon.

La malliberejoj pleniĝas per arestitaj ĉefoj de akademia junularo, kiu la ideojn de libereco portis inter la laboristajn amasojn, kiu sin nutris per vortoj de ribelo kaj sopiro al libereco kaj sendependeco.

El inter la alvokoj, proklamacioj, entuziasmaj poeziaĵoj tuj konkiras la unuan lokon belega versaĵo de l' dudekjara Sieroszewski, titolita „Kion ili volas“.

La spirtribelo, esprimita en la versaĵo kontraŭ la sociaj parazitoj, kontraŭ tiuj, kiuj de laboristo deŝiras la lastan ĉermizon — estas tre bela en sia destino. Per tiu-ĉi versaĵo ekkomencis Sieroszewski sian pezan laboron sur la kampo de literaturo kiel ankaŭ sur la kampo de revolucia agado.

La esenco de „Kion ili volas“ ekatestis pri la talento, signante samtempe Sieroszewski'n kiel batalanton pri justeco, kaj kio plej grava — pri libereco de subpremita nacio.

Wacław Sieroszewski naskiĝis en jaro 1858. El la gimnazio li sin transĵetis al serurista metio, daŭrigante sian edukadon per legado de ekzotaj romanoj kaj poezioj kaj per studado de pozitivistoj.

En jaro 1878 pro partopreno en laborista movado li estas arestita kaj ekzilita Siberion, kie dum dekeljara restado li okupiĝis per sciencaj studoj kaj verkado.

Lian grandan varkon pri Jakutoj (Dekdu jaroj en lando de Jakutoj, 1901) eldonis la Geografia Societo en Petroburgo. Laŭvice aperadis sekvantaj verkoj: Sur arbarandoj (1894), En embusko (1895) R ŝtaŭ (1900, Tagiĝo (1901), Ĥinaj rakontoj (1903), La reveno (1904), La forkuro (1905), Ol-Soni-Kisaŭ (1906) kaj aliaj: Esti aŭ ne esti, De ondo sur ondon, Beniowski, Oceanø, Dronejo (en jaroj 1907-1914).

En jaro 1903 faris Sieroszewski vojaĝon tra Japanujo, kiun li priskribis en la verko „Al malproksima Oriento“ (1904) kaj „Koreo“ (1906).

En la verkoj de Sieroszewski estas substrekinda la fakto, ke lia verkista individueco desegniĝis klare kaj forte de la unuaj ĝis la lastaj verkoj, restante ĉiam la sama kaj subĝante al preskaŭ neniam hezitoj. Unuvorte, Sieroszewski ne malfideliĝis al siaj idealoj, ne trompis la esperon de tiuj, kiuj vidis lin esti vera batalanto pri la libereco—tia li restis ĝis hodiaŭ, estante jam ĉe fino de sia vivo kaj verkado.

La individueco de Sieroszewski ne estas komplikita, ne prezentas malfacilan por disligo nodon — ĝi estas rekta kiel la animo de bona homo. Ĉar el ĉiuj romanoj kaj verkaĵoj de Sieroszewski eliĝas viziĝo de homo, kiu per siaj agoj kaj verkoj meritis tiom altan nomon, kia estas la homo.

El tio rezultas, ke la rilato de Sieroszewski al la herooj estas tipa kaj unufanka.

Tiuj herooj estas similaj, havas animojn egale konstruitajn, plenajn de altruismo kaj ĉiuj havas unu celon: per la homo al nacio — per la nacio al homaro; ili ĉiuj estas elmetitaj je sennombraj danĝeroj — sed fine ili estas tamen savitaj — ĉar venkas la optimismo de Sieroszewski.

La kredo al la tuthomara idealo kiel klare elmontras la civilizitan barbarecon de Eŭropo. Iranta al la ekzotaj popoloj kiel semistino de kulturo kaj bonaj moroj.

„Ĥinaj rakontoj“ estas akuzo kontraŭ la „kulturportantoj“ — ĉiuj aliaj romanoj ĝenerale — apologio de l'homeco.

Fine la romano „Silentejo“ estas kvazaŭ kompletigo de la ideoj de Sieroszewski. El tiu-ĉi romano eliĝas tre klare lia tuta spirita strukturo, lia boneco kaj antaŭ ĉio la homareco kaj neŝanĝemo de starigita al si idealo.

„Silentejo“ apartenas al vico de romanoj pure polaj; ĝi karakterizas la polan antaŭmilitan vivon kaj estas mila dokumento, ke Sieroszewski restis fidela al la ideoj, starigitaj al si en la juneco kiel direktivoj.

Plej grava dokumento, konstatanta la ideocon de Sieroszewski, lian batal fervoron por libereco, lian neelĉerpeblan forton kaj kredon je la liberigo de Polujo—estas lia aliĝo al la polaj Legionoj en jaro 1914 kaj batalo kun la malamiko sur la batalkampo, malgraŭ, ke Sieroszewski nombris jam t'iam preskaŭ sesdek jarojn.

Al la idealoj de sia juneco li restis fidela, kaj tial, krom grava signifo en la pola literaturo, estas Sieroszewski modelo de homo, kiu super ĉio ekamis la justecon kaj homecon, kaj kiu tutan sian vivon batalos kun la perforto, subpremo kaj malnobleco.

Karol Piłowski.

Polska na 16-ym Kongresie Esperantystów w Wiedniu.

Na 16-ym Wszechświatowym Kongresie Esperantystów w Wiedniu, trwającym od 6—14 go Sierpnia r. b., delegacja polska składała się z około 50-ciu osób. Prócz licznych członków Polskiego Towarzystwa Esperantystów, na Kongresie reprezentowane były: Towarzystwo „Konkordo“, Akademickie Koło Esperantystów, Krakowskie Towarzystwo „Esperanto“, Lwowskie Towarzystwo Esperantystów, a nie brakło też i pojedynczych esperantystów z różnych części kraju (Wilno, Pomorze, Śląsk).

Na uroczystym otwarciu kongresu, wśród licznych oficjalnych przedstawicieli państw zagranicznych zajmował miejsce również poseł nadzwyczajny i Minister Pełnomocny Rzeczypospolitej Polskiej, Hrabia Zygmunt Lasocki, który — jak i inni przedstawiciele państw — przemawiał w 2 ch językach: ojczystym i Esperanto.

Przedstawicielem esperantystów polskich, obecnych na kongresie, wybrany został jednogłośnie profesor D-r. Odo Bujwid, Prezes Polskiego Towarzystwa Esperantystów, który też, w charakterze przedstawiciela naszego ruchu esperanckiego, był jednym z siedmiu Wice-prezesów Kongresu.

Prezes Centra Komitato, D-r. Edmond Privat z Genewy, w swojej świetnej mowie inauguracyjnej, dwukrotnie cytował pisarzy polskich (Mickiewicza słowa prorocze o zmartwychwstaniu Polski i ustęp z „Faraona” Prusa).

Po posiedzeniu dokonano zdjęcia delegacji polskiej z panem Ministrem Lańcockim (pod pomnikiem Beethovana, naprzeciw siedziby Kongresu).

Na swym III-im posiedzeniu, Kongres na wniosek Centra Komitato uchwalił jednomyślnie skierować do Rządu Polskiego pismo dziękczynne, a to z okazji wiadomości, że Rząd nasz zezwolił na wwoz do kraju bez cła pomnika, ufundowanego ze składek esperantystów ku czci twórcy języka Esperanto — D-ra L. L. Zamenhafa. Pomnik ten stanie na jego mogile w Warszawie.

Na tymże posiedzeniu, w dyskusji nad nowym regulaminem kongresów esperanckich, przyjęto trzy poprawki, wniesione przez przedstawiciela Polskiego Towarzystwa Esperantystów.

Specjalne zebranie studentów-esperantystów uchwaliło założyć „Internacia Studenta Ligo” ze stałą siedzibą w Warszawie. W ten sposób stolica nasza staje się centralą akademickiego ruchu esperanckiego.

Ostatnie zgromadzenie ogólne kongresu poświęcone było w przeważnej części nader doniosłemu wnioskowi Polskiego Towarzystwa Esperantystów w sprawie „Lingva Komitato”. Referował wniosek wice-prezes Polskiego Towarzystwa Esperantystów P. Jan Kosteczki.

W dyskusji udział brali najwybitniejsi esperantyści wszystkich krajów, wypowiadając się za przyjęciem wniosku.

Niespodzianką było, że specjalnie gorąco przemawiał za wnioskiem także delegat litewski, p. Medem z Kowna.

Wniosek przyjęto jednomyślnie, z poprawkami formalnymi p. Edmonda z Welwyn Garden City (Anglja).

Rzadko się zdarza, aby jakiś naród mógł się pochwalić tyloma sukcesami na jednym kongresie.

Uczestnik.

Miesiąc esperancki.

Romulus Voinescu, jeneralny dyrektor policji w Rumunji, wprowadził język Esperanto jako przedmiot obowiązkowy do szkoły policyjnej dla szarż oficerskich.

W Białymstoku 8-go czerwca nastąpiło uroczyste otwarcie Towarzystwa esperantystów imienia Zamenhafa. W przemówieniu wstępnym prezes Szapiro zwrócił uwagę na to, jak carat zupełnie jawnie prześladował Esperanto w Polsce, poczem przemawiali: zastępca wojewody białostockiego naczelnik departamentu Kikiewicz, panowie Dryl i adwokat Litauer z Warszawy.

Esperantyści są zainteresowani odbywającym się tego roku wszechświatowym Kongresem pocztowym w Sztokholmie. Na kongres wpłynęła petycja z 13339 podpisami z 36 krajów o wprowadzenie języka Esperanto w zakresie obejmującym dziedzinę spraw związanych z działalnością poczt i telegrafów.

W czerwcowym dodatku literackim „Esperanto Triumfonta” znajdujemy udatny przekład Wiesenfelda „Hymnu do miłości” Tetmajera.

„France Esperanto” w numerze 29 podaje dowcipny artykuł o języku francuskim, jako o języku międzynarodowym, na zasadzie próbek z czechosłowackiego „Jitra”, w którym drukowane są artykuły i w języku francuskim. Taki międzynarodowy język francuski stałby się tylko żargonem bardzo dalekim od pięknej mowy francuskiej.

Zaczyna wychodzić Wüstera Encyklopedyczny słownik Esperancko-Niemiecki. Angielski „International Language” z czerwca 1924 r. podaje, iż będzie to dzieło monumentalne, a sądząc z zeszytów, które się już ukazały, znaczenie jego dla nauki i rozwoju Esperanta będzie niezmiernie doniosłe.

Skauci rumuńscy, przybyli 23|IV r. b. na zjazd skautów tureckich do Konstantynopola, porozumiewali się za pomocą Esperanta. Tłomaczami dla nieznających języka Esperanto byli: Ali Tomad Bej, inspektor zdrowia w Turcji i Tiberio Moriau z Bukaresztu, kierownik grupy skautowskiej. Z zazdrością spoglądali nieznający języka Esperanto skauci na tych swoich kolegów tureckich i rumuńskich, wśród których nastąpiło takie łatwe i serdeczne zbliżenie, dzięki językowi Esperanto, którym tamci władali.

„Amerika Esperantisto” podaje do wiadomości, że Liga amerykańska do spraw radjokomunikacji otrzymała tyle podpisów, aby język Esperanto był wprowadzony do radjotelefonji, iż postanowiła, aby w razie wprowadzenia języka międzynarodowego do komunikacji radjotelefonicznej, żaden inny język nie był przyjęty, tylko język Esperanto.

Numery 11—12 miesięcznika „Bulgara Esperantisto” stanowią zakończenie pięciu pełnych roczników tego pisma, przedstawiającego wyraz trwałej pracy bułgarskich pionierów Esperanta.

Na przygotowawczej konferencji dla celów międzynarodowego radjotelefonicznego porozumienia odbytej w Genewie, okazało się, iż około 50 proc. osób przemawiało w języku

francuskim (szwajcarscy i francuscy delegaci) i około 50 proc. przemówień było w języku Esperanto. Dwa razy tylko słyszano przemówienia w innych językach (niemieckie i włoskie). Ustala się coraz bardziej przekonanie, że język Esperanto będzie przyjęty jako język porozumiewawczy w rozmowach pomiędzy obcymi sobie językowo krajami.

Wiadomem jest, że pruski minister oświaty uznał za pożądane i skierował dyrektywę do podwładnych mu instytucji, aby nauka Esperanta, jako języka pomocniczego prowadzona była w szkołach. Nie przebijające w środkach nieliczne kółko idystów, podając do wiadomości w gazetach o tym rozporządzeniu pruskiego ministra oświaty, postarało się, aby kilka gazet przy słowach nauka Esperanta dołączyło „i nauka Ida”. Jest to fałsz dla najbardziej nieuprzedzonego widoczny, bo śmiesznym jest uznanie przez jednego ministra dwóch języków międzynarodowych. Doprawdy, bardzo nieliczni propagatorzy Ida, jako języka międzynarodowego nie chcą pamiętać o słowach mistrza Zamenhofa: „Jednością zwyciężymy, chociażby cały świat walczył przeciw nam; niezgoda zrujnować mogłaby nasze dzieło prędzej, niżby to mogli uczynić wszyscy wrogowie naszej sprawy”.

W Japonii, w mieście Sendai, gdzie odbywał się kongres japońskich esperantystów, podczas tegorocznego święta kwiatu wiśni „Sokonsai”, japońscy esperantyści urządzili dla celów propagandy Esperanta manifestację. Na skrzyżowaniach ulic porozwieszano olbrzymie afisze. Sporządzono tort, którego kawałki były owinęte w różnobarwne papiery z napisami propagandystycznymi. Od wczesnego poranku 30 go kwietnia około 250 studentek przewędrowało przez tłumy, sprzedając kwiaty i tort. W miejscowym parku urządzone pięknie udekorowany sztandarami esperanckimi bufet. Wszystkie kwiaty i tort w przeciągu dwóch godzin były rozsprzedane; przez miasto przebiegały w rozmaitych kierunkach automobile, na których powiewały zielone sztandary esperanckie i z których od czasu do czasu przemawiali mówcy. Na drugim miejscu kuli ziemskiej, w Szwajcarii w Lucernie, również podczas święta kwiatów, przebiegał pięknie udekorowany i ozdobiony esperanckimi insygnjami automobil. Był zdjęty film, utrwalający manifestacyjny pochód esperantystów przez miasto. Chcący nabyć ten film, który znakomicie przyczynić się może dla celów propagandy Esperanta, zgłaszać się winni do Komitetu Święta Kamelji i Mimozy w Lucernie pod adresem: S-ro Carlo Gilla, prezid. de Esp. Grupo.

Prof Leopold Kronenberg zgłosił do Komisji szkolnej Księstwa Cieszyńskiego zapytanie, z prośbą o informacje co do

możliwości wprowadzenia Esperanta do szkół i otrzymał odpowiedź, że nauka Esperanta do szkół Księstwa Cieszyńskiego może być wprowadzona, lecz tymczasowo jako przedmiot nadobowiązkowy, zgodnie z prawidłami, dotyczącymi przedmiotów nieobowiązkowych, a mianowicie: o ile znajdzie się odpowiednia ilość chcących się uczyć Esperanta i nauczyciel, posiadający prawa nauczania w szkołach.

Coraz bardziej w Europie i Ameryce rozpowszechniać się zaczyna nauka Esperanta drogą radiotelefoniczną. Profesor przemawia i wyklada choćby w New Yorku, a słuchać mogą wykładów jego życzący sobie tego słuchacze w najrozmaitszych miejscach kuli ziemskiej jednocześnie, o ile posiadają odbiorcze aparaty.

Libroj kaj gazetoj.

Arguso (Julio — Aŭgusto), *The British Esperantist* (231), *Brazila Esperantisto* (1 — 4), *Bulgara Esperantisto* (11—12), *La Espero* (4, 6, 7), *Esperanto Triumfonta* (196, 197, 198, 199, 200, 201, 202), *Esperanto and its critics* (angle). Komparante zorgeme Esperanton kaj idon la aŭtoro, profesoro de la lingvo germana kaj lektoro de kompara filologio en universitato de Liverpool montras al ni la senduban superecon de Esperanto, kiu sola solvis la problemon de lingvo internacia. *Espero Teozofia* (4—5), *Esperanta junularo* (18), *Farmacio kaj Ĥemio* (eldonaĵo de esperanta grupo Tojama Farmacia kolegio. — Japanujo), enhavanta notojn pri farmakologio. *France-Esperanto* (29), *Fundamentaj dokumentoj pri la oficialaj institucioj de Esperanto* (1914), *Germana Esperantisto* (7, 8, 9), *Ĥolandia Esperantisto* (126, 127, 128, 129, 130, 131, 132, 133, 134, 135), *Informoj de Esperanta Asocio de Estonio* (6, 7, 8), „*Informo pri la Tragedio de l' homo*“ de Miĥaelo Zichy (traduko de Kalocsay el hungara lingvo), *Internaciaj Informoj* (Kolekto de flugfolioj pri Ĉeĥoslovakio), *La Interligilo* (organo de la unueca poŝta federacio de Francujo. № 8), *International Language* (6, 7), *Laborista Sporto* (1.), „*La leipziga foiro*“ (bela specimeno de la reklamo kun vidindaĵoj de Leipzig kaj leipziga vivo dum la foiro). „*Preparaĵoj de tutmonda intereso*“ (esperantaj reklamiloj por la kuracistoj kaj por la publiko de sanigaj preparaĵoj), *Internacia Radio Servo* (Aprilo) enhavas kortuŝantajn rememorojn pri nia majstro en la artikolo „*Kant kaj Zamenhof*“. *Radio Rundschau* (1), *La Revuo Orienta* (7), *Sennacieca Revuo* (10, 11, 12), *La Suaa Kruco* (№ 48, Melburno), *La Suno Hispana* (85), *Völker-Spiegel* (12, 13).

LEGU LA GAZETON

„ESPERANTO TRIUMFONZA”

Semajna

Aktuala

Ilustrita

▼
Grandformata
▲

Senpagaĵ monataĵ aldonoj:
„REVUO”

(literatura kaj popolscienco)

„INTERNACIA KOMERCO”

Administracio:

HORREM BEI KÖLN, GERMANLANDO

„Wolna Myśl — Wolne Żarty”
i „Nowy Dekameron”
to najmiliza lektura dla wazytkich.

OD ADMINISTRACJI.

Prenumerata roczna ESPERANTYSTY POLSKIEGO wynosi 6 złp. Do numeru niniejszego załączamy czeki P. K. O. z prośbą o wpłacenie należności.

**Czytajcie i Prenumerujcie
Miesięcznik Ilustrowany**

Lot Polski

jest jedynem pismem lotniczem,
wydawanem przez Ligę Obrony
Powietrznej Państwa Polskiego
pod redakcją

pptk. J. Grzędzińskiego.

„Lot Polski” daje przegląd
lotnictwa i jego zagadnień w kra-
ju i zagranicą.

**Redakcja i Administracja:
WARSZAWA, NOWY ŚWIAT 14.**

.....

**Prenumerata roczna 7 złp., kwart. 2 złp.
numer pojedynczy 85 gr.**

**Jarabono de POLA ESPERANTISTO (12 numeroj)
en kaj eksterlande 6 złp. (6 frankoj)**

Redaktoro kaj eldonanto: STANISŁAW KAROLCZYK

Presojo: Edmund Kokorzycki, Łódź, Podlesna 28.